Alfonso en la unua vico de la pioniroj povis bone vidi la grandan generalon en la speciala pavilono. Li havis militistan kaj oficialan surtuton, kun oraj epoletoj kaj jako, kovritaj per grandaj insignoj, kiuj brilis en sunradio. Malantaŭ li startis militistaj komandantoj kaj landaj eminentuloj. Entute ili estis 10-12 personoj, kiuj administris la landon...Denove li ekmemoris la fraton. "Pedro ĉiam diris: "ĉiuj devas administri la landon, ne unu aŭ kelkaj".

La komandanto alvenis al pavilono, kie unu malgranda flago estis instalita. Li levis la manon. La pioniroj antaŭen-irante batadis la piedojn firme sur la teron. Alfonso pli forte batadis la piedojn, sed farante tion pensadis ... En tiu mateno, kiam ili enportis la kadavron de sia frato domen, lia tuta korpo plenis je vipaj frapoj kaj nun kun piedbatado harmonia sur-teren li sentis la sonon de la vipoj sur korpon de sia frato, kvazaŭ li vipis la korpon de sia frato...Li memoris, ke li ĉiam diris: "Popolo devas havi rajton libere eldiri siajn opiniojn" kaj nun ĉar li diris kontraŭ la diktatoreco, alfrontis al tia destinaĵo**. Ĝis tiam oni kredigis lin, ke ĉiu malaperinto estas perfidulo...Li bone konis sian fraton. Pedro ne estis perfidulo, do, ankaŭ aliaj malaperintoj ne estis perfiduloj kaj en la lando apenaŭ familio troviĝis, en kiu ne estis junulo malaperinta.

Li subrigardis al aliaj pioniroj. Iliaj vizaĝoj ŝajnis decidemaj. Pri kio ili pensis? La sono de harmoniaj batoj kun vipaj frapoj envolvis en liaj oreloj... Komandanto ĉiam diris: Ĉiu afero farita en la lando estas laŭ ordono de granda generalo. Do la murdo de lia frato ankaŭ estas per lia ordono kaj ankaŭ aliaj masakroj... Li sentis, ke li komplicas en tiuj ĉi pekoj, ankaŭ aliaj pioniroj...Do, li devas fari ion...Sed kion? Ek-pensis li ion ...

Tuj ektimis li...Se oni komprenus?... Sed ne, neniu povus kompreni...unu voĉo inter dek milaj voĉoj ne estos distingebla...Ĉia-okaze li ankaŭ devas montri, ĉiu havas rajton libere eldiri tion, pri kio havas kredon...

Aliaj pioniroj apude batadis la piedojn kaj iradis... Li estis komplikitaj en tiaj pensoj, kiam la komandanto alvenis antaŭ la pavilono de granda generalo kaj mallevis la manon, kio signis al pioniroj elbuŝigi la grandan sloganon...Alfonso laŭ pove kriis:

"pereu generalo"...

kaj samtempe tiu slogano eliĝis el milaj buŝoj...Por la unua fojo la ĉielo nigriĝis el birdoj...La folioj komencis fali de la arboj... Ĉiu popolo aŭdis la poemon de la slogano.

Naskiĝ-datreveno de la granda generalo **

Verkis: S-ro Ali Behzadi, aperita en BUKHARA periodaĵo numero 25

Tradukis: **M. Fahmi**



Iranaj virinoj aktivaj eksterlande kaj enlande

Reza Ĥejrĥah

Kiel oni vidas en novaĵoj dum lastaj jaroj multaj iranaj virinoj gajnis internaciajn rekonojn pro siaj diversaj agadoj. Jen kelkaj el ili:

1- S-ino Ŝirin Ebadi, kiu gajnis Nobel-premion de paco antaŭ kelkaj jaroj.
2- S-ino Anouŝeh Ansari, kiu fariĝis la unua virino en la mondo, kiu kiel vojaĝanto iris al spaco.
3- S-ino Kamelia Batmangeliĉ, kiu en Britio antaŭ tagoj gajnis la titolon Virino de la Jaro, pro sia mult-jara agado rilate al helpo al malriĉaj infanoj.



Ŝirin Ebadi



Anouŝeh Ansari

Tiuj du lastaj, estas virinoj naskitaj en Irano, tamen nun loĝantaj ekster Irano. Tio kaj multe da similaj kazoj montras ke Iranaj virinoj estas aktivaj kaj agresaj (pozitiv-sence) pri sociaj kaj eĉ politikaj kaj aliaj agadoj.

Ankaŭ en Irano nuntempe estas multaj virinoj kiuj por akiro de virinaj rajtoj senĉese kaj sen_time agadas. Antaŭ kelkaj jaroj laŭ raporto de la mondfama jurnalo "National Geographic" en Irano 53% da universitataj studentoj estas inaj. Ankaŭ en eduka sistemo de Irano estas pli da virinoj en instruaj fakoj kaj similaj, ol viroj.



Kamelia Batmangeliĉ

Cetere eble en Irano estas la plej multe da profesiaj film_reĝisorinoj en la mondo kun nombro de 6. Kelkaj el ili jam en internaciaj Film-Festivaloj gajnis premiojn.

Ŝahla Lahiĝi, **elstara eldonisto kiu profesie okupiĝas pri virinoj aferoj kaj estas tre fama pro sia laborado.**

Fine mi menciu ke ankaŭ inter iranaj Esperantistoj estas multaj inoj, kiuj diverskampe agadis kaj agadas. En redakcio de Irana Esperantisto,

Tragedio reokazinta ...

En 12a de farvardin (unua de aprilo) iu viro en Masir vilaĝo de ĥuzestano, vekis sian 22 aĝan filinon el la dormo kaj diris al ŝi : "Mi intencas mortigi vin." La filino por lasta fojo trinkis tason da teo ĉe la patro kaj poste ne trovinte okazon kisi per tremantaj lipoj la vangojn de sia du aĝa filineto, kun la patro, kiu jam tenis ŝovelilon ekiris al sia ofer-loko, por ke pro sia kulpo farita du jaroj antaŭe post la vidviniĝo, koncerne ne leĝa rilato kun iu viro, pagi grandan rekompenson.

Tiu-ĉi virino 22 aĝa, nomita Neĝat, helpis la patron en fosado de sia tombo kaj poste fikse rigardante al ĉielo kuŝis en sia tombo kaj en momentoj ne kredeblaj kun pli da pacienco, sen krii aŭ peti helpon aŭ forkuron el sia sinistra kaj amara sorto cedis al sia patra volo. La patro malrapide verŝis la teron sur ŝiaj piedoj, brusto kaj sur ŝia kapo kaj vizaĝo kaj Neĝat nur ĉe la lasta momento kiam ŝia patro volis verŝi pugnon da tero al ŝia vizaĝo petis lin pri zorgi ŝian du aĝan filineton. Post 22 tagoj, la sekreto de tiu-ĉi krimo malkaŝiĝis. La patro de Neĝat post la arestiĝo tuj konfesis al entombigo de sia filino.



Neĝat savo

Se ni povus savi Neĝaton, tiam ni estus iu granda. Ni homoj jam kutimas, ni jam kutimas sub-metiĝi al vivo, en kiu la aferoj tre rapide for-viŝiĝas. Ni homoj jam kutimas per skrap-gumo, viŝtuko aŭ per ter-verŝado sur malhonoreco purigi ankaŭ malhonoron. Se en et-angulo da niaj grandaj mal-liberejoj troviĝus ĉambro, en kiu malliberulo eĉ por du tagoj en sia vivo povus vivi, vidi respekton, oni rigadus lin/ŝin kiel homo, ne kiel ilo, tiam Neĝat por sin savo, en silento kviete ne plu kuŝis sub la tero. Neĝat vidante la ĉielon povus ĝui. Ŝi marŝante sur tero povus fieri. Neĝat povus sperti la senton de patrin-honoro, sed ....



Tiu virino ĉiam mamnutrante sian filinon, kiu iam estis malhonoro de kelkaj triboj, honte ŝvitis. Ŝi firme brakumis filineton, sed tuj forigis ŝin de si, ĉar ŝi sciis ili baldaŭ disiĝos kaj ŝi alkutimiĝon plu ne volis. Ŝi eĉ ne volis rigardi al senpekaj okuloj de sia filineto, por ke en morto-tempo, tiuj rigardoj la vivon ne faru al ŝi plaĉa. Neĝat forkuris el vivo kaj fuĝis al morto, ĉar ŝi jam de longe mortis. Estis jaroj, ke ĉiuj rigardis ŝin kiel netaŭgulo, ke ŝi nur povas esti kunulo de malvarma muro kaj malmola ligna trunko. Neniun ŝi havis por elverŝi la koron. Nenies subtenon ŝi havis. Neniu komprenis, ke ankaŭ vidvino deziras, amon, sentimenton, spriton kaj eĉ korpon. Neĝat mortis por ke la viroj kredu, ankaŭ virinoj post

vidviĝo bezonas edzon. Neĝat estas afero, kies vizaĝo ne nur puriĝas per tero, sed tiu ĉi profunda mort-fosaĵo, momenton post momento pli profondiĝas por montri, ke ankaŭ virinoj kiel viroj volas vivi.

Kvankam en nia kulturo laŭ antaŭaj generacioj oni kredas post la morto de edzino, la edzo ne povas resti sola kaj li devas preni edzinon aŭ kiam virino ne montras inklinon al edzo, la viro povas ankoraŭ foje edziĝi. Kvankam normale estas se viro postulas pli da infanojn, la virino malgraŭ malsaneco devas malvole cedi al koncipiĝo, akuŝo kaj prizorgo de infanoj por ke la edzo ne prenu krom-edzinon. Kvankam se la viro estus senila, ties kulpon kaj rezulton nur sur-ŝultras la virino brulante en patrin-sopiroj, por ke la fiero de viro ne ofendiĝu. Kvankam... sed Neĝat en tera lito montris ke virino havas rajton, edziniĝ-rajton, patrin-rajton, kunul-rajton kaj viv-rajton.

La virin-speco ĉu vidvino, ĉu edzeniĝ -aŭ ne-edziniĝinta kiel viro havas rajton, la rajton de atento, respekto, kompreniĝo... Enterigu la Neĝatojn, sed iliaj filinoj iam kreskos kaj demandos de vi: "Kial vi ne ĉirkaŭis mian patrinon? Kial vi ne helpis ŝin? Ĉu mia patrino por aŭdi, nenion havis diri? Ĉu ŝi parolis kun vi? Aŭ vi ĉiam preter-vidis ŝin? Kial vi ne hepis ŝin atingi al sia ankoraŭ-foja edzeniĝ-deziro? Kial vi ne helpis ŝin havi honorindan viron apud si?" Vere kiam honor-kurteno dis-ŝiriĝas, ĉiuj scenoj ek-aperas malgraŭ aliaj vidas sin sen pekaj.

Elprenita el tag-ĵurnalo(Hammihan-Samlandano) jaŭde 27 ordibeheŝt 1386

La verkisto: S-ino Fateme Mostafavi

La trdukisto: M. Fahmi

Mi estas viro, ĉu ne?

Geedzoj volis iri al vilaĝo. Sur ilia vojo estis rivero. Kaj ili ne povis facile transpasi ĝin. La virino diris al sia edzo: vi surdorsigu min por ke ni transpasu la riveron.

Li pretekstis kaj la deziron ne plenumis.

La edzino diris: "vi viras kaj vi devas ĉi tiun aferon akcepti". Sed la viro evitis ankoraŭ.

Finfine, la virino surdorsigis la viron, sed ŝi laciĝis dum la vojo kaj ŝi diris lin, kiom peza estas li.

La viro diris: Nu, mi estas viro, ĉu ne?



Tradukis: Mahbube Morad

"Keteb-e Metro 13", Zijaeddin-e Ŝafii, Desegnis: Said Razaĝi, Unua eldono:2007, Eldonis: Naŝre Ŝahr, Tehrano.

Ĉiuj miaj onkloj

Golam Reza Azarhuŝang

La knabineto, surmetis siajn ĉiujn ludilojn planken de la ĉambro kaj montris ilin al sia amikino unu post la alia.

Vidu tiun pupeton, kiel bela estas ĝia hararo! Tion aĉetis por mi, tiu onklo, kiu estas alta. Kaj vidu tiun ĉi. Estas homa roboto; multan povon ĝi havas. Kiam ĝi ekpaŝas, la ĉambro tap... tap sonoras pro ĝiaj povo kaj pezeco. Ĉi tiun donis al mi, tiu lipharula onklo. Kaj ĉi tiun trajnon aĉetis por mi, tiu ridema onklo. Tiu, kiu ĉiam pinĉis miajn vangojn kaj diradis, "oh, kiel koketulina knabineto"!

"Ĉu mi ankaŭ povas ludi kun viaj ludiloj"?

La knabineto elektis iun malgrandan pupeton kaj donis ĝin al sia amikino.

"Tiu ĉi por vi, se vi dezirus ludi, sed atentu ke ne detrui ĝin. Ĉu bone"?

"Ĉu estos mia, vere"?

"Ne, nur kiam vi venas ĉe mi, vi povas ludi kun ĝi".

La ŝlosilo turniĝis en la ŝloso kaj la pordo malrapide malfermiĝis.

La viro alpaŝis en la halon. La knabineto antaŭenigis sian kapon kaj tuj vidinte la viron, embarasite komencis kolekti siajn ludilojn, kaj diris al sia amikino: "Iru rapide, mia patro alvenis." Kaj antaŭ ŝia forlaso, reprenis pupeton, kiu estis donata al ŝi kaj ŝin puŝegis eksteren de sia ĉambro. La viro, vidinte ilin kaj tiujn ludilojn ekkriis: "Denove vi spektaklumis? Kolektu tiujn ĉi rubaĵojn, tuj!" Kaj al knabineto, kiu estis eskapanta, diris: "Kial vi ĉiam estas ĉi tie? Ĉu vi mem ne havas hejmon, ke de-matene ĝis-vespere vi vagadas ĉi tien"?

La knabineto, sen iu vorto, eksteriĝis el apartamento kaj forte fermis pordon malantaŭ si. La viro diris: "Bastardineto!" kaj iris al la ĉambro de sia filino. Ŝi ankoraŭ estis kolektanta siajn ludilojn, kiam la viro forte piedbatis ilin kaj ekkriis al ŝi: "Multfoje mi diris al vi, ne invitu tiun ĉi knabineton ĉi tien. Sed ĉu povas vi aŭskulti min? Ne! Mi ĉiam devas toleri aŭ vian patrinon aŭ vin. Ambaŭ vi estas aĉaj, unu pli ol la alia...!" Kaj piedbatis ankaŭ knabineton kaj eksteren iris el la ĉambro.

La knabineto, eĉ ne supren-prenis sian kapon kaj silente kolektis siajn ludilojn kaj enmetis ĉion en sian ĉambran komodon kaj fermis ĝian pordon. Poste ŝi eksidis tie kaj fiksrigardis iun angulon.

Kiam sonoris la apartamenta sonorilo, la knabineto elsaltis kaj kuris al elektra pord-malfermilo kaj puŝis ties butonon kaj diris: "Estas panjo, panjo alvenis"!

La viro ne moviĝis de sia loko. Tiel, kiel li estis sidanta sur tapiŝo kaj apogata al turkmena dors-apogilo, li forte fumis sian finrestan cigaredon kaj ĝin estingis en cindrujo, apud amaso da aliaj cigaredostumpoj. Aŭdiĝis paŝadoj de virino sur ŝtuparo. La knabineto malfermis la pordon de la apartamento kaj kuris bonvenigi sian panjon. En la manoj de virino estis multaj pakaĵoj de nutraĵoj.

La knabineto diris: "Saluton panjo"!

La virino, metis siajn portaĵojn sur la interŝtuparon, metis sian manon sur lumbo kaj iom movadis sian korpon, kaj diris: "Venu kaj helpu min. Mi laciĝis sub tiuj pezoj"!

La knabineto tiris sian manon kaj prenis unu el tiuj pakaĵoj.

La virino diris: "Ne! Tiu por vi estas peza. Prenu tiujn," kaj donis al ŝi du pakaĵojn, en kiuj estis tomato kaj muelit-viando. Kaj mem prenis aliajn pakaĵojn kaj eksupreniris. Kiam ŝi alvenis en la halon kaj la viron vidis, mallaŭte salutis lin kaj grumblis: "Vi almenaŭ povis veni al mi por helpi".

La viro, sen rigardi al sia edzino, diris: "Same kiel vi kunportis ilin ĝis ĉi tie, do vi povas ankaŭ kunporti tiujn ĉi lastajn paŝojn".

La virino murmuris: "Aĉa pigrulo!" kaj iris al la kuirejo. Metis pakaĵojn de nutraĵo sur plankon de kuirejo kaj turnis sin al sia filineto, kiu sekvis ŝin al kuirejo. "Dankon Mami. Surmetu ilin ĉi tien".

La knabineto, metis la pakajojn sur la plankon de kuirejo kaj diris: "Paĉjo piedbatis min. Ankaŭ miajn ludilojn. Li volis rompi ilin, ĉiujn".

La virino diris laŭte: "Li nur tiun ĉi lernadis de vira tempo." Kaj malfermis la pordon de fridujo.

La viro diris: "Kio denove? Kial vi parolaĉas?". Li elprenis alian cigaredon de cigaredujo, kiu estis falita antaŭ lia gambo sur la tapiŝo kaj enmetis ĝin en sian buŝangulon.

La virino enmetis nutraĵojn en l' fridujon unu post la alia kaj terpoman kaj cepan pakaĵojn malplenigis aparte en du-etaĝa korbo, kiu estis en la angulo de kuirejo. Poste, rekte ŝi alvenis al la antaŭkuireja tablo, kiu estis inter kuirejo kaj halo, kaj apogis siajn kubutojn sur ĝia ŝtono kaj diris: "Kial vi vane koleriĝas al tiu filineto"?

La viro diris: "Jes, mi faros tiel, ĉar tiuj ludiloj por mi estas nur ĉagrenajoj, kaj vi kolektis ilin ĉi tien"....

La virino diris: "Oh, eble tio ne estas bona por via fiero?! Estas bone ke por mia edzo ankoraŭ gravas fiero"!

La viro grumblis: "Denove tiu ĉi aĉulino ekparoladis".

La virino diris: "Se vi malkontetus, iru al diablo. Nur tiam kiam laborante vi gajnos iom por nia travivo, vi rajtos ordoni al mi kion faru aŭ ne faru! Eble vi pensas ke mi volonte iras ĉe aliulojn, ĉu jes? Malgraŭ tiom multe da riskoj pri danĝeraj malsanoj"!?

La viro diris: "Kie troveblas laboro? Multaj eĉ pli bonaj ol mi ne sukcesas trovi laboron." Kaj li fumis la novan cigaredon, kiun li ĵus ekbruligis, kaj dissendis ĝian fumon en la ĉambran areon.

La virino revenis al kuirejo. Prenis ŝi kelkajn terpomojn kaj tenis ilin sub la akvo de krano kaj sufiĉe bone purigis ilin. Poste ŝi prenis ankaŭ du grandajn cepojn kaj metis ilin kun lavitaj terpomoj en plastikajn korbojn kaj kun granda kuir-tranĉilo kaj unu poteto revenis al la halo kaj sidis apud la viro, kaj komencis senŝeligi la terpomojn.

"He, lasu nin. Ni vidis ke vi eĉ iomete ne klopodis konservi trovitajn laborojn"?

"Ĉu vi pensas ke vere ili estis bonaj laboroj por mi? Fakte ili preskaŭ estis senpagaj laboroj. De-matene ĝis-vespere mi devis multe labori kaj fine? La mono ĉe ili estis kiel animo, kiu ne volis disiĝi de ilia korpo"!

"Bone, bone. Ne bezonas por mi preteksti. Diru, fakte vi ne emas labori, kaj ne plu".

"Vidu virino, kial ni diskutas? Ni multfoje priparolis, ĉu ne? Do, kial denove devas komenci tiun ĉi temon"?

"Bone, se vi ne ŝatus ke ni parolu pri tio, mi silentegos. Ĉu bone"?

La viro, kelkfoje profunde parfumis sian cigaredon kaj sinturnante kontraŭ sia edzino diris: "Ne diserigu tiujn cepojn ĉi tie, tio eklarmigas min".

La virino diris: "Ne plu ordonu?" Kaj kolektis ĉion kaj iris al kuirejon. La knabineto, kiu ĝis tiam estis sidanta en angulo de la halo, kaj silente rigardadis siajn gepatrojn, ekstaris kaj sekvis sian patrinon irantan al kuirejo.

"Panjo, ĉu eblas mi iru al hejmo de Mehri?"

"Ne, iru kaj ludu kun viaj ludiloj. Ne estas bone ĉiam iri al hejmo de iu".

La knabineto montris sian patron kaj diris: "Li ne lasas min fari tion".

La viro etendis siajn gambojn kaj sen rigardo al sia edzino kaj filineto, laŭte diris: "Jes, mia filino! Vi ne sekvu vian panjon, ŝi havas aliajn aferojn irante al hejmo de aliuloj".

La virino proksimiĝis al la kuirej-tablo kaj kriis: "Almenaŭ hontu ĉe via filino"!

La viro ekridis: "Oh, vidu kiu parolas pri honto. Se iu ne scius, tiu pensus ke eble ŝi estas sanktulino".

La virino prenis kuirejan tranĉilon kaj skuis ĝin al la viro: "Se vi ne fermu vian buŝon, vere mi per tiu ĉi tranĉilo mortigos vin kaj min mem ankaŭ kaj tio estos la fino".

La viro diris: "Tio estas ekzakte mia deziro. Do, kial vi hezitas? Rapidiĝu"!

La knabineto kaptis la jupon de sia patrino proksimigante sin al ties gambo kaj diris: "Panjo, panjo, mi timas".

La virino ĵetis tranĉilon sur la kuireja lavejo kaj prenis la manon de knabineto kaj kunportis ŝin al ĉambro kaj diris: "Ludu ĉi tie. Mi volas vidi kiu kuraĝas ion diri"?

La virino eksteriĝis el la ĉambro kaj fermis ties pordon malantaŭ si kaj iris al la viro. La viro etendante siajn gambojn, estis apoganta al dors-apogila tapiŝo kaj daŭre fumadis. La cindrujo estis plena. La virino sidis apud la viro.

"Ĉu vi deziras ke mi preparu ilojn por fumi opion"?

"Kiam estos bezonata, tiam mi mem diros al vi".

"Ĉar mi pensis eble vi hontas tion diri".

La viro rigardis al la virino, klinis siajn gambojn kune kaj pli rekte apogis sin al dors-apogilo kaj diris: "Ĉu vi ne volas lasi min. Ĉiam riproĉado"!

La virino diris: "Vi komencis".

La viro diris: "Vi ne estimas min eĉ ĉe nia filino".

La virino diris: "Estimi? Ĉu vere io estas restita por estimi"?

La viro diris: "Ne, vi ne volas fini". Kaj dorse sidis kontraŭ virino.

La virino de malantaŭe kaptis ŝultrojn de la viro kaj lin returnis al si mem: "Vidu, estas pli bone ke vi ne rolludi por mi. Tiel estas pli bone por ni ambaŭ. Vi vivu por vi mem kaj mi por mi mem. Se vi estas tre malkontenta de tiu ĉi situacio, ni povas simple disiĝi".

La viro ŝtelis sian rigardon de severa rigardo de la virino kaj malsuprenfaligis sian kapon. La virino lasis ŝultrojn de la viro kaj diris: "Vi eĉ ne havas kuraĝon decidi pri simpla afero kaj malgraŭ tio, vi parolas pri estimo kaj fervoro"!

La viro rigardis virinon vid-al-vide kaj sputis sur la tapiŝon kaj forte frapis al la virina vango kaj grumblis: "Aĉa prostituistino. Nun vi ordonas al mi kion fari"?

La virino surmetis sian manon al sia vango. La viro aŭdante ŝian plorsingultadon ekstaris kaj iris al necesejo kaj fermis ties pordon forte.

La virino subite ekvidis la filineton, kiu estis rigardanta ŝin terurante apud malfermata pordo de la ĉambro. Ŝi ekstaris kaj iris al ŝi. La filineto malantaŭen iradis. La virino per sia mandorso purigis siajn larmojn kaj eniris al la ĉambro. Ludiloj de la knabineto estis sur la tapiŝo. La knabineto proksimiĝis al ŝi kaj diris: "Panjo"?

La virino karesis ŝin tuŝante ŝian hararon per siaj manoj kaj diris: "Jes, mia kara"?

La knabino diris: "Mia paĉjo estas tre malbona homo. Mi amas miajn ĉiujn onklojn pli ol mian paĉjon. Eĉ tiuj kiuj ne donacas min ludilon".

La virino kisis sian filineton kaj diris: "Ne diru tion, malgraŭ ĉio, li estas via paĉjo".

★

Voli nek lian donacon, nek lian viziton

Al malriĉulo okazis bezono. Oni diris al li ke: "estas iu tre riĉa kiu kompreninte vian situacion helpos vin". La malriĉulo diris: "mi ne konas lin". Oni diris: "ni konatigos vin al li". Ili iris ĉe la riĉulo kune. La riĉulo estis paŭte sidanta nervoze. La malriĉulo ne parolis kaj revenis de tie. Oni demandis: "kio okazis?"



La malreiĉulo respondis:mi nek volas lian donacon, nek volas lian viziton.



Tradukis: Mahbube Morad

"Keteb-e Metro 13", Zijaeddin-e Ŝafii, Desegnis: Said Razagi, eldono:2007, Eldonis: Naŝre Ŝahr, Tehrano.

Irana instruisto en Tajvano

Esperanto en Mara Universitato de Kaohsiung bone fiŝkaptis!

La Tria Internacia Kunveno pri Marokulturo okazis en Nacia Kaohsiung Mar-Universitato dum du tagoj (19a k. 20a de oktobro 2006). Reza Ĥejr-ĥah estis invitita por doni prelegon pri Esperanto (kaj mar-kulturo).

Profesoroj kaj spertuloj el Singapuro, Japanio, Irano, Usono kaj Ĉinio partoprenis la kunvenon kiel prelegantoj aŭ specialaj gastoj. La tuta nombro de la partoprenantoj (inkluzive de aŭskultantoj) estis ĉirkaŭ 250.

Reza Ĥejrĥah donis la prelegon angle en unu plena horo kaj prof. CM Cho (konata kiel Abengo, kaj kiu proponis la prelegon) interpretis ĝin en la ĉinan antaŭ 120 aŭskultantoj, kiuj plenigis la preleg-ĉambron. Inter ili estis ekzemple la universitataj profesoroj, prezidanto kaj gravaj gastoj alilandaj. Post la prelego kelkaj demandoj estis responditaj.

Apud la prelegejo estis ekspozicio de Esperantaĵoj (Esperantaj libroj, vortaroj, kompakt-diskoj, sonkasedoj ktp). Klementina (estrino de lingva lernejo en Kaohsiung, kie nun estas du kursoj de Esperanto) kaj Vinjo (Esp-studento) estis apud la ekspozicio por doni klarigojn pri Esperantaj aferoj.



Kelkaj el la partoprenantoj decidis lerni Esperanton kaj aĉetis librojn.

Post la prelego la universitato esprimis intereson oferti Esperanto-kurson al studentoj kiel kredita leciono en la venonta semestro kaj la universitata prezidanto persone invitis Reza kiel la instruisto.

Laŭ la raporto de prof. Cho (Abengo)

PS:
Abengo estas nov-bakita E-isto, kiu de julio eklernis ĝin kaj jam verkis vortaron kaj lernolibron de Esp. en la ĉina lingvo.★

Damno al buŝo kiu dum ne taŭga tempo malfermiĝas!

Iam iu iris al urbo de vilaĝo piede. Tagmeziĝis kaj li malsatiĝis. Li sidis sub arbo ĉe grenkampo por ripozi. Lia edzino estis metinta por li manĝaĵon. Li pensis eble ĝi estas peco da viando, aŭ femuro de kokino aŭ almenaŭ kuirita ovo. Li eligis ĝin por manĝi sed li vidis sopire ke ĝi estas pano kaj fromaĝo. Ankoraŭ li ne estis manĝinta ke ĉevalrajdanto venis. La viro komplimentis la ĉevlarajdanton kaj hazarde la ĉevalrajdanto haltis, staris kaj diris al si mem "ne estas ĝentile rifuzis lian komplimenton". Li rigardis la ĉirkaŭaĵon kaj ne trovis ejon por ligi bridon de la ĉevalo, do demandis la viron kie mi ligu la bridon?



La viro estis pentinta pro sia ne taŭga komplimento, do li respondis: ***sur mian langon!***

Tradukis: Mahbube Morad
"Keteb-e Metro 13", Zijaeddin-e Ŝafii, Desegnis: Said Razagi, Unua eldono:2007, Eldonis: Naŝre Ŝahr, Tehrano.

Floroj el "La Florejo" de Sadio

Elektis kaj tradukis: d-ro Kejhan Sajjadpur

Ankoraŭ burĝonas floroj en ĉi tiu budo de Sadio. Bonan flaradon.

Ĉio rapide atinganta laŭron, tio havos mallongan daŭron.

هرچه زود برآید، دیر نپاید.

Mi aŭdis ke ĉina telero kreiĝas
dum kvardek jaroj el orienta tero,
Centoj fariĝas ĉiutage en Mardaŝt,
Certe kostas malmulte tia telero.

خاک مشرق شنیدەام که کنند
به چهل سال کاسەای چینی
صد بروزی کنند در مردشت
لاجرم قیمتش همی بینی

Kokid' serĉas manĝon elirinte el ovo,
sed al homido mankas saĝo kaj sin-movo.
Rapide famiĝinta ne atingos alton,
sed la mala superas ĉion per la povo.
Vitro ĉie troveblas, do tio ne karas,
Juvelo sed karas pro malfacila trovo.

مرغک از بیضه برون آید و روزی طلبد
و آدمی بچه ندارد خبر و عقل و تمیز
آنکه ناگاه کسی گشت، بچیزی نرسید
وین بتمکین و فضیلت بگذشت از همه چیز
آبگینه همه‌جا یابی، از آن قدرش نیست
لعل دشخوار بدست آید، از آنست عزیز

***

Mono estas por vivkomforto; vivo ne estas por monkolekto. Oni demandis saĝulon: "Kiu estas feliĉa kaj kio estas malfeliĉo?" Li diris: "Tiu feliĉas kiu portis kaj konsumis, kaj tiu malfeliĉas kiu mortis kaj ne gustumis".

Ne preĝu por fiulo nenion farinta*,
ne utiliginta kaj dumvive ŝparinta

مال از بهر آسایش عمر است نه عمر از بهر گرد کردن مال. عاقلی را پرسیدند: نیک بخت کیست و بدبختی چیست؟ گفت: نیک بخت آن‌که خورد و کشت و بدبخت آن‌که مرد و هشت.

مکن نماز بر آن هیچ‌کس که هیچ نکرد
که عمر در سر تحصیل مال کرد و نخورد

***

* Islamanoj preĝas apud la kadavro de jus-mortinto.

Nokton mi rememras, kiam kara amikino travenis la pordon; tiel embarasite mi ekstaris, ke mian lampon mi estingis per la maniko.

Venis amikino pro kies brilo foriras mallum',
Min mirigas mia sort'; de kie venis tia fortun'.

Ŝi eksidis kaj riproĉon komencis:"Kial vi estingis la lampon, kiam vi vidis min?" Mi diris:"Pro du kialoj: unue mi pensis ke la suno leviĝus kaj alie mi rememoris jenajn versojn miajn :"

Se abelo venas ĉirkaŭ kandelo
Ekstaru kaj mortigu la abelon
Kaj se venas ridantino plaĉ-lipa
Prenu ŝin kaj mortigu la kandelon."

شبی یاد دارم که یاری عزیز از در درآمد، چنان بی‌خود از جای برجستم که چراغم به‌آستین کشته شد.

سری طیف من یجلو بطلعته الدجی

شگفت آمد از بختم که این دولت از کجا؟

بنشست و عتاب آغاز کرد که مرا در حال بدیدی، چراغ بکشتی به چه معنی؟ گفتم: بدو معنی. یکی آن که گمان بردم که آفتاب برآمد و دیگر آن که این بیتم به خاطر بود.

چون گرانی به پیش شمع آید

خیزش اندر میان جمع بکش

ور شکر خنده ایست شیرین لب

آستینش بگیر و شمع بکش

***

Astronomo alvenis hejmon kaj vidis fremdulon sidantan kun sia edzino. Li diris insulton kaj estigis tumulton. Saĝulo informite pri tio, diris:

"Ĉu vi scias kio estas sur l' ĉiela sidejo?
Ne sciante kiu estas en via rezidejo."



منجمی به‌خانه درآمد، یکی مرد بیگانه را دید با زن او به‌هم نشسته، دشنام و سقط گفت و فتنه و آشوب برخاست. صاحبدلی که براین واقف بود، گفت:

تو بر اوج فلک چه دانی چیست؟

که ندانی که در سرایت کیست

Bona ĵurnalo, miasupoze, estas nacio parolanta kun si mem. Arthur Miller

Bonaj amikoj, bonaj libroj kaj dormema konscienco,: jen la ideala vivo. Mark Twain

Bonaj elspezantoj estas malbonaj pruntedonantoj. Benjamin Franklin

Bonaj leĝoj estas produktoj de malbonaj moraloj. Macrobius

Bonkonduto estas sentema konscio pri la sentoj de aliaj homoj. Se vi posedas tian konscion, vi posedas la arton de bonkonduto, egale kian forkon vi uzas. Emily ost

Inda kuraco hinda: Ajurveda

Antaŭparolo:

Nepre ankaŭ vi ĉi-frazojn fojfoje aŭdis aŭ legis: "Prevento pli gravas ol kuraco." kaj "Prevento prioritatas al kuraco.". Kvankam ĉiperiode tio atentindas, tamen tio ne rilatas nur modernan kaj ĝeneralan kuracon. Ĉar je preskaŭ antaŭ 5000 jaroj hindaj kuracistoj sekvis san-rimedon, kies ĉef-celo estis preventi kaj pli fortigi korp-organojn mekanisme.

Ajurveda, kies diven-vorto estas sanskrita, signifas sciencon de viveco kaj proponas atentindan rimedon ĉiterene por konservi la sanon.

Ajurveda = Jugino!

Ĉiuj ni konas hindujon kiel regiono de variaj kredoj kaj skoloj, ankaŭ tio de diversaj medicin-rimedoj. Kiel kuraci malsanojn per diferencaj formoj, kiuj ĉiuj aparte havas spertojn je miloj da jaroj, kun multaj avantaĵoj de tradicia kuracado hinda. Unu el branĉoj de tiaj kuracoj kompletiĝaj nomiĝas Ajurveda, kio dum cenrtjaroj per scientistoj de natura scienco perfektiĝis post sperti, studi kaj analizi.

La plej frua teksto pri tio koncernas 5-an centjaron antaŭ kristnasko. Sed ankaŭ pli antaŭe plej ĉefaj hind-kuracaĵoj iel rilatis ajurvedajn rimedojn, kies datoj taksiĝas je antaŭ preskaŭ 4000 jaroj. Preskaŭa je sama dato libro pri fundamentoj de Ajurveda verkiĝis far hinda sciencisto nomata Ĉaraka kun listo de diversaj 500 drogoj resaniĝaj.

Nepre ĉiu volas scii kiajn avantaĵojn ĉefajn havas ĉi kurac-sistemo kun tiom da longega precedento?! Respondon ni legas flanke de D-ro Vasant, direktoro de instituto Ajurveda en Usono:

"*Ajurveda emfazas preventon kaj fortigi korp-organojn. Ĉivide mensoj kaj korpaĵoj ne nur efikas unu la aliajn severe, sed unueca kolektaĵo nomata Menso entute formas korpon.* "

Li mencias:

"*Alturnado de usonanoj kompare al pasintaj jar-dekoj nun 100-obligis. Multe da homoj per fari jugajn provojn koniĝas kun Ajurveda, ĉi tiel oni nomis tion kiel fratino de Jugo. Fakte jugo estas komenc-pordo por enveni Ajurveda-on.* "



Ne ekvilibreco kaj malsaneco!

Ajurved-lernaĵoj instruiĝas kiel rimedo kaj vidpunkto. Ĉi tio nin lernigas ke saneco kaj ĝojeco estas normala vivo kaj natura; do ni por konservi kaj teni tian vivon devas apliki diversajn aferojn kiel konsideri specialan dieton, vegetarajn drogojn, mediton kun jug-provadoj kaj spiradaj ekzercoj nomataj Pranajama. Se ĉi aferoj orde praktiĝu, tiam ni atestas fortecon de korp-sistemo, kio mem sole povas kontraŭi funkciojn, kiuj malsanigas homojn. Ajurvedistoj kredas malsano okazas ĉefe pro perdo de natura ekvilibro de diversaj korp-organoj.

Do krom atenti maldoloron kaj sanon de malsan-signoj, ĉefa afero estas ĝustigi ekvilibrecon kaj helpi al malsanuloj por sekvi sanan vivon por ne plu malordiĝo de funkciado de diversaj korp-organoj, tiel preventi malsanojn. Saneco kaj ekvilibreco estas ĉefa ŝlosilo de longa vivado sen malsano. Ĉi-vidpunkte ne deca dieto, negativaj sentoj kaj maltrankviloj estas ĉefaj problemoj por malekvilibreco. Ĉi mis-miksaĵoj formas venenojn, kaj nura savo estas ŝanĝi viv-rimedon. Kuraco de ajureda

inkluzivas decan dieton, masaĝon per vegetaraj oleoj, sang-eltirado kaj uzi laksigojn.

Alia kuraco en Ajurveda nomiĝas Ŝirud-Hara, kies metodo estas verŝadi oleojn dum 30 minutoj sur frunto de malsanulo. Ĉi metodo dum preskaŭ 3 ĝis 10 fojoj daŭras por ekvilibriĝo de korpaĵoj. Plej grava instruo de Ajurveda kiel scienco de vivado jenas:

- *Nia sano dependas al metodo de niaj vivo kaj konduto.*

-*Ĉiutage kaj eĉ ĉiuhore ni povas elekti sanon aŭ malsanon.*

-*Kiam ajn ni saĝe decidas, tiam naturo donacas nin per feliĉo kaj sano, sed vivo sensaĝe kaj malekvilibre nur rezultigas malsanon.*

Ajurveda scias sanecon kiel naturan korp-situacion, kaj kredas ke naturo disponis tutajn bezonaĵojn de la korpo por konservi sanecon. La korpo ĉiam renkontas malsanigajn faktorojn, kiel bakteriojn, virusojn, alergiigajn materiojn kaj eĉ danĝerajn materiojn nomatajn karcinogenoj, kiuj kontraŭas al sekura korp-sistemo por konservadi sanecon. Fakte hom-korpo enhavas mem-ordadon por aranĝi ekvilibrecon.

Konu mem karakteron!

Laŭ filozofio de Ajurveda, ĉio kaj ĉia fenomeno en ĉi tiu mondo elformiĝas per unu el kvin elementoj, t.e. akvo, fajro, tero, vetero kaj etero (Tero povas esti sama grundo. Vetero fakte estas gasoj de ter-atmosfero.). Karaktero de ĉiu dependas al venkanta elemento, kion ni konas kiel ies ĉefa elemento. Laŭ ĉi-vidpunkto tiuj elementoj pare miksiĝas kaj tri ĉef-karakterojn formas, kio nomiĝas Duŝa aŭ same karaktero.

En ĉies korpo, unu el tiuj karakteroj estas kiel venkanta, kio formas ĉies individuajn trajtojn. Do por preventi kaj kuraci homojn, oni devas komence koni kaj indiki ĉi tiujn trajtojn. Fakte tio estas ĉies samaj distingoj fizike, pense kaj sente, kio videblas en ĉiu homo. Ajurveda ĉi tri grupojn gravajn dividas al Vata, Pita kaj Kafa, kies signifojn sube ni priskribas.

Unua grupo estas personoj kun trajto venkanta Vata; ili ordinare magras. Ili havas sekajn haŭtojn faltajn kaj ofte malforte decidas. Tamen ili havas altajn mens-povojn kun fortaj kreintaĵoj ankaŭ tre rapidas aktive kaj parolade. Aliaj trajtoj de ĉi-grupo Vata estas kolera kaj angora; ili pretas por malsanoj kiel sen-dormado, konstipo, pneŭmonio, artrito kaj emfizomo.

Dua grupo estas tiuj kun la trajto Pita; ili havas varman korpon, sebuman haŭton, multan apetiton kun proporcia korp-organo. Ĉi homoj rapide reflektas ĉirkaŭajn okazojn kaj pretas al febro kaj inflamaj malsanoj.

Tria grupo (Kafa) kontraŭas al Vata, la grupanoj estas indiferentaj, pardonemaj, donacemaj kaj bone renkontas aliajn. Ili ne deziras sportojn kaj aktivadon kaj ofte suferas korp-pezecon. Malrapide trafikas, kaj preferas manĝaĵojn plen-salajn kaj -grasajn. Ĉi homoj sentivas koncerne al malvarmumo kaj infektoj de sinusoj kaj diabeto. Ajurveda-istoj konsilinte por difini venkantan karakteron de malsanulo, entreprenas pri deca medikamento. Malsanuloj de ĉiu grupo bezonas diferencajn mangaĵojn kaj apartan viv-programon, sed sen atento al tio aperiĝas diversaj malsanoj.



Klinikaj atestoj!

Diversaj studoj jam pruvis utilajn efikojn de Ajurveda pri kuracado de malsanoj. Unu el ĉi studoj estas klinika, kio dum jaro 1990 fariĝis. Rezulto de tiu studado montris bon-efikon al diabeto per suko de planto nomata Ĝinma Siluster, kiu kontrolis hiperglisemion (ekmultiĝo de sukero de sango). Kuraco per tiu planto daŭris 18 ĝis 20 monatojn kaj 22 malsanuloj partoprenis la projekton; ili krome uzis ordinarajn medikamentojn antaŭ apliki plantajn medikamentojn. Ĉiuj malsanuloj ekmontris atenteblajn saniĝojn kaj eĉ 5 malsanuloj jam ĉesis ordinarajn medikamentojn, kompreneble post aprobo de siaj ĉef-kuracistoj. Alia esploro en 1995 fariĝis sur 60 malsanuloj, kiuj suferis de la malsano de Parkinson. Specialistoj dum 12 semajnoj aplikis medikamenton ajurvedan nomatan HP-002. Al alia grupo de 26 malsanuloj samaj preskribis ĝenralaj medikamentoj. Rezulto de Ajurvedaj medikamentoj montris altegan bonefikon pri malkresko kaj kontrolo de malsan-signoj.

Alia studo komplete distingis enfluon de Ajurved-medikamentoj al malkreskado de kolesterolo kaj triglicerido en la sango. Tiaj medikamentoj malaltigis kolestrolojn ĝis preskaŭ %20, dum kiam samtempe malaltigis ankaŭ triglicerido ĝis preskaŭ %27.

Alia nun-tempa esploro estas komuna projekto de sciencistoj de medicin-universitatoj Johns Hopkins kaj UCLA kun hindaj medicinistoj. Tiu projekto analizas klinikan efikon de ajurveda kuraco por artrito hepatito-C, diabeto kaj osteoartrito.

Adiaŭon al melankolio!

Vidpunkte de orienta kuraco tradicia, al kuraci melankolion per fundamentoj de okcidenta psikologio multaj mankas. Oftaj drogoj uzataj por tio enhvas aliflankajn aŭ apartajn efikojn krom kuraco de melankolio. Tamen en okcidenta metodo oni ne proponis ĉefan rimedon por preventi melankolion aŭ haltigi reaperon ĉe eks-melankoliuloj. Preskaŭ duono de tiaj malsanuloj atestas revenon de siaj psikproblemoj. Kontraŭe ajurvedistoj klopodas longtempan ekvilibrecon, kio haltigas revenon de malsaneco. Ajurveda studas aparte diversajn malsanojn, interalie melankolion. Fari korpan ekvilibron naturan sekve de aurved-leĝoj estas natura medikamento por melankolio.



Alia grav-punkto estas pli rapida efiko de ajurved-medikamentoj ol aliaj medikamentoj ordinaraj.

Kompreneble oni devas atenti pri uzado de ajurvedaj medikamentoj nur subtene de specialaj medicinistoj, kaj oni nemiam devas mem ĉesi siaflanke specialajn medikamentojn uzatajn. Interesa punkto pri ajurveda estas, ke kvankam en hindujo mem tiun kurac-metodon pli uzas mizeruloj, kiuj ne povas pagi altajn kurac-kostojn ordinarajn aŭ modernajn, tamen tiun kurac-metodon en okcidetnaj landoj ĉefe Usono pli uzas riĉaj tavoloj!

Kuraco per Ajurveda en okcident-landoj semajne kosatas 1500 ĝis 3500 dolarojn!!

Tradukinto: **Mojtaba KHEIR-KHAH**

Fonto: Ĉiu-matena irana ĵurnalo Ĝam-e-Ĝa'm/ Anekso Ha'kim/

Fotoj:
http://www.ajurveda.net/ajurveda/index.php



Ada Sikorska-Fighiera

De tajgo al minaretoj

El la tag-libro de 11-jarulino

Ekde la momento de la eniro de la sovetaj taĉmentoj en Pollandon meze de septembro 1939, estis klare, ke ilia celo estis „engluti" la polajn orientajn terenojn. Por atingi tion, estis necese elimini la malamikan por ili polan elementon kaj anstataŭi per sovetaj civitanoj.

La unua amasa deportado, eble la plej terura, ĉar tute neatendita, okazis jam la 10.II.1940: dum unu nokto oni forprenis tiam pli ol 220.000 homojn, precipe kamparanojn (tutajn familiojn kun infanoj). En la sama jaro, la 13.IV. similan sorton havis 320.000 kaj fine de junio pli ol 240.000 personoj *(Tie ĉi oni ne enkalkulas la polajn militkaptitojn de 1939 kaj enkarcerigitojn; la totala cifero estis preskaŭ 2 milionoj).* Aldoniĝas al tio ĉ. 200.000 poloj devige forveturigitaj al Sovetunio en junio 1941. Elsiritaj el siaj hejmoj – senkonsidere la aĝon, familiajn ligojn kaj sanstaton – ili estis kondamnitaj al pereo. Ĉiujn turmentis soifo kaj malsato, kaj depende de la sezono frostego aŭ varmego. Multaj ne travivis la plursemajnan vojaĝon en bestaj vagonoj.

La rusoj destinis al la deportitoj ĉefe kvar regionojn: la ĉirkaŭaĵojn de la Blanka Maro, terenojn antaŭ Uralo, ĉe Workuta, terenojn en la okcidenta Siberio, kaj la stepojn de Kazaĥistano.

La sorto de ĉiuj estis simila: sklava laboro kun minimuma rekompenco, kaj la „rajto" ricevi 400 gr. da nesufiĉe bakita nigra panaĉo... .

La kondiĉoj inter la vivo en la nordo kaj la sudo estis sufiĉe diversaj, ne nur pro klimato. En la norda tajgo dense semitaj estis lagroj kun „speciale danĝeraj" polaj elementoj (kaj ne nur...) por Sovetio... Inter ili estis lokitaj „vilaĝoj" (setlejoj), konstruitaj grandparte de pli fruaj deportitoj el Ukrainio, Bjelorusio kaj Kazakio. Situitaj ĉe la riverbordoj, en la densa arbarego, ili „oferis" rifuĝon en simplaj lignaj barakoj kaj laboron ĉe la elha-kado de arboj.

En Kazaĥistano la situacio estis malsama: tien oni venigis ĉefe la familiojn de polaj oficiroj, policanoj k.s., do preskaŭ nur virinojn kaj infanojn. Ili estis dividitaj inter diversaj „kolĥozoj", tre malriĉaj, ear la plej grandan parton de la rikoltoj forprenadis la stato. La resto – dividita proporcie al la farita laboro, estis absolute ne sufiĉa por travivo.

Por la poloj – la deportado orienten ne estis io nova. Ni trovis en la malvarma nordo la postsignojn de niaj avoj, ekzilitaj al Siberio post la insurekcio de 1863 – 64 *(Pollando de 1795 ĝis 1918 estis dispartigita inter tri tiamaj potencoj: Aŭstrujo, Prusujo kaj Rusujo).* kiuj siavice malkovradis tie la spurojn de la deportitoj post la pli frua insurekcio de 1830 – 31. Sed eĉ ili ne estis la unuaj. Tia estis nia orienta najbareco... pri tio en aliaj landoj oni tute ne havas ideon!...

La komenco de la germana - soveta milito, la 22-an de junio 1941, komplete ŝanĝis la situacion de la poloj en Sovetunio. La malsukcesoj ĉe la fronto devigis Sovetunion turni sin al la aliancanoj. Por la poloj la plej grava estis la „interkonsento Sikorski – Majski". Fine de aŭgusto al la plej granda parto de la poloj alvenis novaĵo, ke la ĉefo de la Pola Registaro en Londono, gen. W. Sikorski faris la 30.VII.1941 pakton kun la Soveta registaro, laŭ kiu ĝi „donis amnestion" al ĉiuj poloj.

Bedaŭrinde, el inter pli ol unu miliono, nur parto (ĉ. 116.000 personoj) sukcesis evakuiĝi al Irano (aprilo kaj aŭgusto 1942). En tiu kvanto troviĝis 45.000 civiluloj. 3000 da ili (la aliaj estis alportitaj al Afriko, Hindio, Meksikio, Nov-Zelando k.s.), plej parte infanoj kaj junularo, trovis feliĉan rifuĝon en la ekzotika persa urbo Isfahano. En tiu malnova, historia kaj bela urbo, la infanoj klopodis retrovi la perditan infanecon, resaniĝis, fortiĝis kaj komencis regulan lernadon.

La taglibreto, kiun mi nun prezentas, ne pretendas esti historia priskribo de tiu periodo. Ĝi estas taglibreto de 11-jara knabino, kiu en leteroj al la amata onklino en Lvovo skribis pri tio, kion siaj infanaj okuloj vidis kaj registris. La postaj partoj estis skribitaj jam en Isfahano kaj Libano.

Mi ne ŝanĝis la tekstojn, nek poluris la stilon. Por ke diversaj faktoj estu kompreneblaj, mi aldonis kelkajn notojn.

Bibiografio:

„Isfahano, la urbo de polaj infanoj" eld. Rondo de la gelernantoj de polaj lernejoj en Isfahano kaj Libano, II-a eld. Londono 1988

***

LA MILITO

La 1-an de septembro 1939 la hitlera Germanio atakis Pollandon. Fine de aŭgusto mia pli juna fratino Marysia kaj mi estis ĉe nia iama vartistino apud Varsovio. La gepatroj, avino kaj mia pli aĝa fratino Krysia – malsana, restis en Varsovio.

1.IX.1939 – Ekstere tagiĝas. Tra la apenaŭ fermitaj eksteraj fenestroj eniras taglumo. La mondo vekiĝas. Subite la silenton rompas malproksima eksplodo. Poste la dua, tria... deka... kun angoro ĉiuj eliras kaj demandas unu la alian: "Ĉu la germanoj komencis la militon?" Bedaŭrinde jes. Dume la pafoj kaj eksplodoj ripetadis ĉiam pli ofte, la bomboj komencis faladi pli proksime. La suno, kvazaŭ pro ĉagreno, sin kaŝis malantaŭ la nuboj.

Ĉirkaŭ tagmezo alvenis la Panjo kaj Paĉjo, por preni nin al Varsovio. En la ĉefurbo regis granda maltrankvilo kaj teruro, la germanaj aviadiloj ĉiam pli ofte bombardadis. Ĉiujn 15 min. la fabrikaj sirenoj anoncadis la aviadil-alarmon.



5.IX.1939 – La sano de Krysia, kuŝanta en hospitalo, daŭre malboniĝadis; la gepatroj decidis revenigi sin hejmen: ĉiukaze, preskaŭ ĉiuj kuracistoj jam estis ĉe la fronto, do ne havis sencon lasi sin en la hospitalo.

Kiam mi rigardis al sia pala vizaĝo, ŝajnis al mi ke la morto staras jam ĉe la pordo. Nur ŝi estis trankvila, kiam la domo tremis pro eksplodoj, kaj si trankviligadis nin ĉiujn. Ĉiuj sentis, ke en Varsovio neniu povos savi sin, ke ni devas forvojaĝi.

La Paĉjo decidis konduki nin al Lvovo, sud-oriente de la lando, kie cetere loĝis la tuta familio de ambaŭ gepatroj.

7.IX.1939 – La Paĉjo aĉetis 2 aŭtomobilojn (mercedesoj): en unua estis farita lito por Krysia, kun si veturis la Panjo kaj Jula (nia helpantino). En la pli granda veturilo trovis lokon la Avinjo, ni du, Paĉjo, liaj du amikoj kaj nia hundo „Zabcia" (Raneto). Posttagmeze ni ekveturis. En la urbo jam bone videbliĝis la sekvoj de la bombardadoj, la milita teruro montriĝadis de ĉiuj flankoj... ruinoj, kadavroj. Ekster la urbo, sur aŭtovojo, kun arbaroj ĉe la flankoj, sajnis pli trankvile... Tamen amasego da homoj kuris en ĉiujn direktojn, en paniko fugante de la germanoj. Nur ĉar la Paĉjo surhavis sian generalan uniformon kaj mia fratino kuŝis malsana, oni lasis nin veturi plue. Kadavroj de homoj kaj ĉevaloj, renversitaj ĉaroj, brulantaj domoj – jen rezulto de la intensa bombardado. Ĉirkaŭis nin mallumo, kiam ni eniris la arbaron – ja oni ne rajtis uzi lumojn, por ne provoki la germanojn. Post noktomezo ni haltis: la ŝoforoj dormis ekstere, ni en aŭtomobiloj. Estis jam sufiĉe malvarme nokte.

Sekvamatene ni daŭrigis, apenaŭ la suno leviĝis. Dum kelkaj horoj ni veturis tra la bela pola tero, ankoraŭ ne tusita de milito. Tagmeze ni haltis en Krasnystaw ĉe la fratoj Dominikanoj, denove bombatako, feliĉe ne tro longdaŭra. Dum tiu halto mia fratino tiel malbone jam fartis, ke nur subita injekcio revenigis sin al la vivo.

9.IX.1939 – Je la 5-a matene ni forveturas, rapidante al Lvovo, pro malbona farto de Krysia. Finfine aperas konturoj de la urbo. Ĉe la polikliniko oni ne akceptas sin. Sed jen denova bombardado, ni travivas gin en iu foso, la gepatroj restas ĉe Krysia kaj aŭtomobiloj.

Ni daŭrigas al „Zielone" (Verda), eksterurba, malnova domo de la patra familio, kie ni du fratinoj restas kun la onklino Lunia (la fratino de Paĉjo); la aliaj veturas al sia loĝejo en la urbo (Tarnowskiego 30), Oh, denove bombardado, la tuta domo tremas kaj ni ĉiuj kun ĝi!

Sekvatage la Paĉjo prenis nin, por instali ĉe la onklo Adamo (la frato de Panjo). Ni

ambaŭ preferis resti tie, ĉar ĉe la onklo Adamo estis niaj gekuzoj, preskaŭ samajaj, Adas kaj Tereska. Panjo kun Krysia eklogis apude, en malgranda memstara ĉambro (iam loĝis tie iu solulo, kiu malaperis). Dume Paĉjo ne revenis al Varsovio por defendi gin – kiel li planis – ĉar generalo Wl. Sosnkowski nomumis lin gvidanto pri la defendo de Lvovo.

Krysia ĉiam fartis pli malbone, ec ne havis forton levigi. La kuracistoj perdis ĉiun esperon savi sin, ĉar oni nur nun, tro malfrue, diagnozis malsanon: ne estis speco de tifo, kion oni supozis antaŭe, sed terura hinda malsano de brutaro brucelosa. La rimed-kuracilo par tiu malofta malsano troviĝis nur... en Germanio..

Iun nokton, la Panjo vekiĝis kaj vidis Krysia sidantan sur la lito, kvazaŭ si volus levigi. Je la demando, kion si faras, si respondis: „Mi devas, iri al la Vistulo, por veturi per motor-boato; mi ricevis ordonon de supre..". Panjo trankviligis ŝin, ke matene ili kune iros tien. Si jam sciis, kion tio signifas ...

13.IX.1939 – Sekvatage alvenis la Paĉjo kaj diris, ke anonciĝas grandega bombardado, kaj konsilis, ke ni translokiĝu al la unua etaĝo, en la bibliotekon de la fratoj Dominikanoj, kie estos pli sekure (kontraŭ grenadoj, almenaŭ). La geonkloj ja loĝis je la 3-a etaĝo. Post matenmanĝo ni komencis translokiĝadi. Je la fino la onklo Adam portis Krynjon, jam treege malfortan. Ŝi ĉirkaŭbrakis lin kaj kisis. Kaj tio estis ŝia lasta tera kiso, ĉar post kelkaj minutoj ŝi mortis. Ni ĉiuj ploris kiel malgrandaj infanoj. Mi sidis kun vizaĝo kovrita per manoj kaj ne povis trankviliĝi. Kiam la sirenoj anoncis la finon de la atako, oni vokis pastron. Post mallonga preĝado, oni prenis sian korpon kaj veturigis al la tombejo Łyczakowski, kie en la 6-loka surtera tombo de la familio Sikorski estis libera loko, tiu de la patro.

EN LA RIFUĜEJO

La saman tagon ni transiris al la vera rifuĝejo, en la kelon de la monaĥejo. Kuŝlokojn oni aranĝis sur valizoj, nur la Avinjo havis feran liton. Vespere preskaŭ tuj post ĉies endormiĝo, teruraj eksplodoj vekis ĉiujn: faladis bomboj, grenadoj trafadis la dom-murojn. Subite eksplodego skuis la tutan damon, ĉiuj pensis, ke la bombo trafis la monaĥejon... Estiĝis paniko, ĉiuj volis forkuri, sed la alvenintaj monaĥoj trankviligis nin, ke tio estis nur grenadoj. Ĉiuj revenis al siaj dormlokoj, sed mi ne plu povis dormi. La saman nokton alia grenado trafis la domon, sed neniu plu vekiĝis. Kiam heliĝis, mi iris rigardi la damaĝojn. Strange... ec ne unu peco trafis la figuron de la Dipatrino, en la fronta muro de la monaĥejo. Dum la tago ni purigis la korton, ĉar ĉie troviĝis rompitaj vitroj de fenestroj, pecoj de grenadoj kaj alia „milita malpuraĵo".

Paĉjo vizitadis nin ĉiutage, alportate novaĵojn; ĉiun trian-kvaran tagon sendadis al ni farunon, sukeron, lardon, mielon ktp.

Du tagojn post la entombigo de Krynjo, la gepatroj veturis al la tombejo, por kontroli, cu ĉia estas en ordo. Reveninte ili rakontis teruraĵojn: la tuta tombejo estas multe damaĝita, el malfermitaj ĉerkoj elfalis freŝaj kaj malfreŝaj kadavroj, ĉia aspektis kiel batalkampo..

Nia maŭzoleo restis, feliĉe, netuŝita. Panjo ornamis gin per ramoj de sorpo kaj eklumigis kandelojn.★

Daŭrigota

Vivo estas tragedio kiam oni rigardas ĝin deproksime, sed ĝi estas komedio demalproksime.

Charlie Chaplin

Vivtenu verdan arbon en via koro kaj eble kantanta birdo alvenos.

Ĉina proverbo

Virto estas la arto de la tuta vivo. Philo

Virto neneiam estis tiel respektenda kiel mono. Mark Twain

Vivo estas la plej bona lernejo kaj la plej malfacila. Afrika proverbo

Viro, kiu ne havas rideman vizaĝon, ne taŭgas por vendi komercaĵon.

Japana Proverbo